

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 38-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2014 N-ro 156

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.



LA LEĜO DE AMO

La amo resumas la tutan doktrinon de Jesuo, ĉar ĝi estas la plej altgrada sento, kaj la sentoj estas la instinktoj, levitaj al la nivelo de la plenumita progreso. Ĉe sia deirpunkto, la homo havas nur instinktojn; pli progresinta kaj koruptita, li havas nur sensaciojn; instruita kaj purigita, li jam havas sentojn; kaj la delikatega punkto de la sento estas la amo, ne la amo en la vulgara senco de la vorto, sed tiu interna suno, kiu centrigas kaj kunigas ĉe sia ardanta fokuso ĉiajn aspirojn kaj ĉiajn revelaciojn superhomajn. Kiam Jesuo eldiris tiun dian vorton “amo”, tiu vorto skuis la popolojn, kaj la martiroj, ekzaltite de espero, malsupreniris en la cirkon. Spiritismo siavice venas eldiri duan vorton el la dia alfabeto; estu atentaj, ĉar tiu vorto levas la ŝtonon de la tomboj malplenaj, kaj la *reenkarniĝo*, triumfante super la morto, rivelacias al la

homo duonblindigita lian intelektan heredan posedaĵon; jam ne al la turmentoj ĝi kondukas lin, sed al la konkero de lia memo, altigita kaj transfigurita. La sango elaĉetis la Spiriton, kaj la Spirito devas hodiaŭ elaĉeti la homon el la materio. La Spirito devas esti kulturata kiel kampo; ĉia estonta riĉeco dependas de la nuna laboro, kaj pli, ol la surterajn bonojn, tiu laborado alportos al vi gloran altiĝon; kaj tiam, komprenante la leĝon de amo, kiu unuigas ĉiujn estulojn, vi ektrovos la trankvilajn plezurojn de l' animo, kiuj estas la antaŭĝuado de la ĉielaj ĝojoj. (Lazaro. Parizo, 1862)



KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo*. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. ĉap. XI – Ami sian proksimulon kiel sin mem, § 8.

Neniam estas Malfrue

Nia kara samideanino JUDITH KOVACS, el Hungario, skribis al ni por informi pri sia plej nova lernantino: S-ino REBEKA (sur la foto). Ni plej plaĉe publikigas ĉi tiun leteron, dezirante al ili ambaŭ sukcesplenan trairon en la vojoj de Esperanto!

Jam delonge mi konatiĝis kun la 82-jara Rebeka. Ŝi plendis al mi, ke ŝi enuis pro la krucenigmoj, do ŝi bezonus alian okupon. Mi donis al Rebeka lernolibron E-an, kaj post kelke da tempo ŝi respondis al mi:

“Pro enuo mi komencis legi la E-an lernolibron. Mi surprizite spertis tion, ke la unuaj kelkaj lecionoj estas facile kompreneblaj kaj tradukeblaj. La gramatiko de la lingvo estas simpla, facila, kaj ege logika, kaj mi trovis multajn konatajn vortojn. Iom post iom ekplaĉis al mi tiu lingvo. Mi petis Judith-on helpi min por pli bone eldiri la vortojn, kaj pli precize kompreni la frazojn.”

Rebeka dum unu jaro legis multon da noveloj, fabeloj, rakontoj ktp. Ŝia vorttrezoro riĉiĝis kaj ŝi faras jam ankaŭ korespondadon. Laŭ ŝi – Neniam estas malfrue komenci lerni Esperanton.



AMIKOJ DE LORENZ



Ni elkore brakumas nian amikon **ISMAEL MIRANDA E SILVA**.

Emerita militisto, naskiĝinte en Septembro 1928 en la urbo Itabirito, ŝtato Minas Gerais, Brazilo. Grava laboranto por la triobla Idealo: Evangelio, Spiritismo, Esperanto. Li estas ano de Brazila Spiritisma Federacio kaj de Asocio Lorenz, kaj estis li kiu komencis la noblan taskon propagandi SPIRITISMON en la UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO. Entute, li partoprenis 23 Internaciajn Kongresojn.

“Karitato estas la amo en movo. Ĉar la leĝo difinis, ke ni faru al aliulo kion ni deziras, ke li faru al ni”. Ismael Miranda e Silva.

Ero de intervjuo publikita en ALMANAKO LORENZ 2013. Se vi volas koni aliajn detalojn pri ISMAEL MIRANDA E SILVA, petu kaj ni sendos al vi la kompletan intervjuon kun li, aŭ legu ĝin en nia paĝo:

<http://editoralorenz.blogspot.com.br/2014/08/almanako-lorenz-2013.html>

ANIM' ĜEMELA DE L' MIA

Anim' ĝemela de l' mia,
De mia vivo lumfloro,
Falinta stel' de la koro
De l' bela spaco sen fin',
Dum mi vagadis tra l' mondo,
Malgaja ombro tutsola,
Jen vi kun rido konsola,
Feliĉa mi sentis min!

Anim' ĝemela de l' mia,
Se rompiĝus nia ĉeno,
Min turmentus la ĉagreno
De l' sopir' en mia ĉel'!
Iam se vi min forlasos,
Adorata dolĉa lumo,
Vin, de floroj ĉe l' parfumo,
Mi atendos en ĉiel'!

Vi venis kun ben' de l' dioj,
Jen lumo sur vojo riĉa,
Por fari min plej feliĉa,
De via kor' ĉe la flam'!
Karega mia trezoro,
Kun vi mi vivos sur Tero;
Vi mia estas l' espero,
Por mi vi estas – la am'!



Emmanuel

XAVIER, Francisco Cândido. *Antaŭ du mil jaroj...* – Epizodoj de la Historio de Kristanismo dum la Jarcento I. Romano de Emmanuel (Spirito). El la portugala lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto. 2-a eldono (reviziita de la Tradukinto). Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1993. 2-a Parto, ĉap. IV – “Tragedioj kaj espero”.

KUNLABORU! COLABORE!
Membriĝu ĉe LORENZ kaj helpu
la disvastigon de Esperanto kaj
Spiritismo en la tuta mondo!

*Associe-se à LORENZ e auxilie
a divulgação do Esperanto e do
Espiritismo em todo o mundo!*

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 38-a – n-ro 156 – Oktobro-Novembro-December 2014

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz

Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal

21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)

Telefonaĵoj: + 55-21-2221-2269 - + 55-21-2450-4768

Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al s-ro C. en Cape-Town (Suda Afriko)

Per poŝta karto mi siatempe respondis al Vi je Via letero, sed post kelka tempo la poŝto redonis al mi la karton kun la subskribo, ke por Via lando poŝtaj kartoj ne estas akceptataj. Tiam mi sendis al Vi jam leteron kovritan kaj mi petas Vin sciigi min, ĉu Vi ĝin ricevis.

Al s-ro C-v.

Inter la esprimoj “doni po 2 pecojn” kaj “doni po 2 pecoj” estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli bona, kaj tial ambaŭ esprimoj estas uzablaj kaj bonaj. Tamen, konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto “po” la “pecoj” jam dependas rekte de la “doni”, ni konsilas uzi post “po” (tiel same kiel post “da”) la nominativon (“doni po 2 pecoj”). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon.

Al s-ro M-n.

Ĉiun, kiu volas ke lia opinio aŭ projekto estu presita en nia gazeto, ni petas: 1) ke li sendu ĝin al ni en formo de aparta kaj preta gazeta artikolo kaj ne en letero kune kun diversaj aliaĵoj; 2) ke la artikolo estu skribita pure kaj tute klare legeble, por ke ni ne devu ĝin transskribi; 3) ke la artikolo estu skribita nur sur unu flanko de la papero kaj ne nur sur la ambaŭ flankoj.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989.

39-a DATREVENO DE LORENZ



La 15-an de Decembro, ELDONEJO LORENZ festis sian 39-an datrevenon. La etoso de la evento estis tre agrabla kaj, en la kadro de la programo, post la malfermo kaj la komenca preĝo, farita de ISMAEL MIRANDA E SILVA, gvidanto de la kunsido, PROFESORO JOSÉ CARLOS LEAL, aŭtoro de pli ol 85 libroj en la portugala lingvo, inkluzive “*O romance de Zamenhof*” (= *La Romano de Zamenhof*), lerte paroladis pri la temo “Zamenhof kaj Lorenz – laborantoj por la paco”. Post la prelego, JULIETA DULCE prezentis Retrospektivon 2014 kaj celojn de nia Eldonejo por 2015. Tuj post la Retrospektivo, la artistoj prezentis belan artan momenton. Por fini la programon, la gvidanto de la kunsido invitis anon de LORENZ, José Roberto, por fari la finan preĝon. Ĝis la 40-a datreveno en 2015!





ORA JUBILEA KONGRESO – ĈU NI SUKCESIS?

Ĉi tiu estas la temo de la 50-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO (BKE), kiu estas kunokazonta kun la 35-a BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO (BEJK), de la 23-a ĝis la 27-a de Januaro 2015, en Rio-de-Janeiro.

Brazilo atendas vin! Partoprenu ĉi tiun historian eventon!

Informiĝu kaj aliĝu al la KONGRESOJ en la paĝo:

<http://esperanto.org.br/info/index.php/pages/kongresoj>

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ

La 8-a BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ okazos la 27-an kaj 28-an de Januaro 2015 en la urbo Rio-de-Janeiro. La temo estas "ESPERANTO – PORDO AL LA HOMA KUNFRATIĜO". Inter la prelegontoj estas S-ro Affonso Soares (FEB). Realigas la eventon Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj (BAES) kun apogo de Brazila Spiritisma Federacio (FEB). Pliaj informoj en la paĝo de BRAZILA ASOCIO DE ESPERANTISTOJ SPIRITISTOJ en Facebook aŭ per la retadreso:

baesbrazilo@gmail.com

SPIRITISTA VOJAĜO AL GERMANIO KAJ DUBAJO

La medio kaj preleganto WAGNER GOMES DA PAIXÃO, el la urbo Mário Campos, ŝtato Minas Gerais, Brazilo, realigis en Oktobro vojaĝon por spiritisma disvastigo al Germanio kaj Dubajo, invitive de pluraj spiritistaj institucioj. Li partoprenis en renkontiĝo de ĉiuj spiritistaj grupoj de Germanio, en Berlino kaj poste prelegis en la urboj Kolonjo, Duseldorfo, Aĥeno, Frankfurto (seminario kun la partopreno de Márcio Cruz), Karlsruhe, Manhejmo, Stutgarto kaj Koblenco. Li vojaĝis tiam al Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, kie li faris kvar prelegojn en la du grupoj de Dubajo: "Grupo Espirita Caminho de Luz" (= Spiritista Grupo Vojo de Lumo) kaj "Grupo Cristão Despertar" (= Kristana Grupo Vekiĝo).

Sur la fotoj:

1. Wagner Gomes da Paixão prelegas en la sidejo de Germana Spiritista Unuiĝo, en Stutgarto, Germanio, kun la temo: "La homa konduto je la lumo de Spiritismo".
2. Prelego kaj kunfratiga tagmanĝo en Dubajo, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj.



ESPERANTISTAJ POETOJ

V. Eroŝenko

HOMARANO

Ekbruligis mi fajron en kor',
Ĝin estingos nenia perfort';
Ekflamigis mi flamon en brust',
Ĝin ne povos estingi eĉ mort'.

Brulos fajr' ĝis mi vivos en mond',
Flamos flam' ĝis ekzistas la ter'.
Nom' de l' fajr' estas am' al homar',
Nom' de l' flam' estas am' al liber'.

Poemo de V. EROŜENKO, el la verko Lumo kaj Ombro, kompilita de Mine Yositaka kaj eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo en 1979.

VASILIJ JAKOVLEVIĈ EROŜENKO (1890-1952). Ruso, instruisto. Blindulo, malgraŭ sia handikapo li multe vojaĝis tra la mondo per Esperanto kaj instruis en multaj landoj de Azio kaj Eŭropo. Verkoj: Ĝemo de unu soleca animo, Turo por fali, Rakontoj de Eroŝenko, Lumo kaj ombro, La tundro ĝemas, Malvasta kaĝo kaj Stranga kato. (Resumo el informoj trovitaj en Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj, verkita de Josip Pleadin k eldonita de GRAFOKOM en 2006)

UNU JARO DE ESPERANTO-MUZEO EN ĈINA UNIVERSITATO

La prezidanto de Zaozhuang-a Universitato de Ĉinio, CAO SHENGQIANG, sendis leteron al la Esperanta tutmonda komunumo, dankante pro la kontribuoj kaj atento al la E-Muzeo. Dum unu jaro post la fondo de la Muzeo, ĝi ricevis pli ol tridek mil kolektaĵojn el ĉirkaŭ 100 geesperantistoj kaj organizaĵoj el la tuta mondo, kaj akceptis dek mil vizitantojn. La kuratoro de la Muzeo estas nia kara samideano S-ro SUN MINĜIAO SEMIO, UEA-Delegito. Kontaktu lin ĉe: semio@163.com

LA SEMISTO DE STELOJ



Brazila Spiritisma Federacio (FEB) invitas al la Ekspozicio "DIVALDO FRANCO – LA SEMISTO DE STELOJ", pri la vivo de la plej eminenta spiritista medio nuntempa kaj lia socia verko pere de la organizaĵo "Mansão do Caminho" (= Palaceto de la Vojo), kiu jam helpis pli ol 35 mil necesbezonaĵojn infanojn el la malriĉaj kvartaloj de Salvadoro (ŝtato Bahio, Brazilo). La Ekspozicio estos malfermita ĝis Mardo 2015, en la sidejo de la Federacio, en Braziljo.

Pliaj informoj en la paĝo de Brazila Spiritisma Federacio en *Facebook*.


EL LA EVANGELIO – “LA VIDPUNKTOJ”

Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo. Johano 18:36

La klara kaj preciza ideo, kiun oni faras pri l' estonta vivo, donas neskueblan fidon je l' estonteco, kaj tiu fido havas gravegajn sekvojn por la moraligo de la homoj, tial ke ĝi tute ŝanĝas la vidpunkton, el kiu la homoj rigardas la surteran vivon. Por homo, kiu sin lokas per la penso en la spiritan vivon, kiu estas senfina, la enkorpa vivo estas nur trauro, mallonga restado en sendanka lando. Sciante, ke li staras en provizora kaj ne definitiva loko, li akceptas la zorgojn de la vivo kun pli da indiferenteco, kaj el tio venas al lia Spirito trankvileco, kiu mildigas la amarecon de la vivo. Tiu, kiu identiĝas kun la estonta vivo, estas simila al riĉa homo, kiu perdas malgrandan sumon kaj ne maltrankviliĝas pro tio; tiu, kiu ligas ĉiujn siajn pensojn nur al la surtera vivo, estas kiel malriĉulo, kiu perdas ĉiujn siajn havaĵojn kaj falas en malesperon.

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo*. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. ĉap. II – “Mia regno ne estas el tiu ĉi mondo”, §§ 5-7.

LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ LANĈOTA EN LA JAPANA



Post kelkaj kunvenoj, la prezidanto de OOMOTO INTERNACIA, Shigeki Maeda, el Japanio, subskribis kun la prezidanto de BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO (FEB), Antonio Cesar Perri de Carvalho, cedigan kontrakton por tradukado kaj presado de versio en la japana lingvo de *La Libro de la Mediumoj*, originale verkita en la franca de Allan Kardec. La bazo de la japana traduko estas la Esperanta eldono, farita de ISMAEL GOMES BRAGA kaj PORTO CARREIRO NETO kaj eldonita de FEB.



Dum la subskribo de la kontrakto, en la 10-a de Decembro, ĉeestis MARIO RIBEIRO DA FONSECA SOBRINHO kaj CATARINA FALCOMER DE OLIVEIRA, kiuj partoprenas al Oomoto de Braziljo kaj BENEDICTO SILVA, spiritisto el San-Paŭlo, tradukisto de pluraj libroj de FEB al Esperanto, inkluzive de la verko *La konsolanto*. En la 13-a de Decembro oni celebris la 10-an datrevenon de OOMOTO en Braziljo.

Fonto: <https://www.facebook.com/BrazilaSpiritismaFederacio>

DEKLARACIO PRI HOMARANISMO



privata propono nedeviga por Homaranismo.
L. L. Zamenhof, 1913

Mi estas homarano: tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj:

- I. Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion.
- II. Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. [...]
- X. Kosciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion aŭ religianstataŭantan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la neutrale-homaj principoj "homaranaj", kiuj konsistas en jeno:
 - a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo "Dio" aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo estas alia ol mia.
 - b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo

de konscienco, kaj ke la ĉefa por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo.

- c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi la homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri per senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas – se la leĝoj de mia lando tion permesas – malkaŝe kaj oficiale nomi min "liberkreda", ne identigante tamen la liberkredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. [...]

Legu la kompletan tekston en:

<http://www.bretaro.net/verkoj/60-deklaracio-pri-homaranismo>

http://eo.wikipedia.org/wiki/Deklaracio_pri_Homaranismo